

Joachim Ringelnatz,

## Genuo-pendo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Mi pendas de turn-stango  
kaj kapen fluas la sango.  
Se estus mi vesperto,  
mi kaptus insektojn kun lerto,  
samkiel museto fluganta;  
dumtage mi estus pendanta  
en iu angulo malhela,  
dormante en sonĝo miela.  
Ho, mia verto – ve-sperto!  
Sentiĝas al mi la inerto!  
- Perversa vespera vesperto -  
Ne eblas plu!  
Tra iu tru'  
malsupre en mia kranio  
elfluas jam mia racio.

*Traduko de la Germana poemo "Kniehang" de JOACHIM RINGELNATZ (Hans Bötticher, \*1883 – †1934) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983-02.*

*MR-034-2 / Arg-584-1177 (2012-05-14 18:39:13)*